# La unua duonjaro

Hieraŭ mi lasis vin kun la sonĝo-tasko imagi kial necesus ĝuste hodiaŭ raporti pri la nuna stato de ILEI. Jen la solvo – en la 22a de julio 2009 la nova estraro estis elektita, do pasis ses monatoj depost tiam. Jen provo resumi (sen kompleteco) la atingojn kaj la tujajn taskojn.

## Atingoj de la duon-jaro

- Ni intensigis la informfluon kaj regule ĝisdatigis la hejmpaĝon.
- Ni unuafoje aperigis la sekciajn raportojn en unu kohera publike alirebla dokumento.
- Ni vastigis la reton de partneroj de du ĝis dek, aldoninte utilajn informojn.
- Ni reorganizis la komisionojn por ke ili interagu regule kun la estraro.
- Ni transigis la kontojn kaj sciojn al nova kasisto kaj malfermis novan bankokonton.
- Ni realigis lastmomente konkretan subtenon al instruista trejnado ĉe UAM en Poznán.
- Ni sukcese prezentis nin en la Malferma Tago de CO fine de novembro (vidbendita).
- Ni aktualigis la 20-jaraĝan interkonsenton inter UEA kaj ILEI.
- Ni sekurigis €2500 da financado de UEA por la nunjara agado.

Jam ni diskonigis tra retlistoj niajn jarajn planojn por 2010 – ili aperos en nia hejmpaĝo kaj en *Internacia Pedagogia Revuo*, numero 2010/1, krome pro nia kunlaboro kun <edukado.net> ili estas spekteblaj filme en Ipernity, ĉe http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/7102264/.

Sekve ne necesas ripeti ilin, sed ni substreku la plej tujajn taskojn, kaj por la estraro kaj por ĉiuj.



Estraranoj en kuba restoracio en Roterdamo post la sukcesa el-paŝo en la Malferma Tago. Ne ĉeestas Julián Hernández Angulo.

## Tujaj taskoj por la estraro

- Lanĉi la varbilan sekcion de nia la hejmpaĝo.
- Transigi la sekcian kaj komitatan grupojn al Guglo kaj fiksi voĉdon-principojn por la komitato.
- Voĉdonigi la komitaton: hispana aliĝpeto, reviziita buĝeto 2010 kaj Interkonsento UEA-ILEI.
- Afiŝi hejmpaĝe (www.ilei.info) liston kaj priskribon de niaj fondaĵoj kun pag-informoj.
- Fermi la kontojn 2009, pretaj por revizorado.
- Finpretigi kaj ekpresi la simpozian kajeron el nia konferenco en Parma.
- Aperigi hejmpaĝe kaj aliloke alvokojn por nova rubrikestro kaj redaktoro por *Juna amiko*.
- Aldoniĝu Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) al niaj partneroj.
- Alvoki februare al Landaj Asocioj de UEA anonci landajn stipendiojn por la unujara instruista trejnkurso ĉe UAM (Poznán) ekde sept. 2010; lanĉi aprile la kvar stipendiojn de UEA-ILEI.
- Konkretigi la planojn por nia kuba konferenco kaj aperigi programon, rezulte de la baldaŭa surloka vizito de nia komisiito pri tiu konferenco.
- Firmigi kaj anonci planojn por la konferenco kaj simpozio en Kopenhago en 2011, kun la aperigo de aliĝilo antaŭ la konferenco en Kubo.

## Tujaj taskoj por vi !

- Remembriĝi al via landa sekcio, tiel ke ĝis mar. 31 ĉiuj sekcioj komuniku siajn membrojn antaŭ la aperigo de IPR 2010/2. (Numero 2010/1 estas jam finredaktita, membroj el 2009 ricevos ĝin)


- Membriĝante, faru laŭeblan donacon al nia Koleghelpa Kaso, kiu nun havas rimedojn por ĉ. 20 kolegoj, dum la bezono estas por ĉ. 40 – i.a. por subteni la starigon de sekcioj en Konga DR, Armenio kaj Pakistano.
- Aliĝu al nia Konferenco en Matanzas – la unua periodo finiĝas je feb. 15. Aliĝante, aldoniĝu al tiuj, kiuj jam solidare donacis al Fondaĵo Dazzini, por ebligi al ni inviti kubajn kaj latinamerikajn kolegojn al la konferenco kaj ligita trejn-seminario.
- Helpu al via sekciestro pretigi la sekcian raporton pri 2009, kiu atingu nin ĝis la 31a de marto.
- Abonu nian revuon *Juna amiko* por 2010, ĉe via landa peranto aŭ nia kasisto. Vidu informojn ĉe <www.junaamiko.inf.hu>
- Se vi aktivas en komisiono, helpi al ĝia gvidanto pretigi ĝian raporton ĝis la fino de marto.
- Varbu por ni membrojn, raportu viajn kursojn, konsultu niajn retejojn, ktp, ktp.



Resume, ne mankas por fari!

Kaj negativaj prijuĝoj? Unu almenaŭ: tro da tempo foruziĝis por solvi rutinaĵojn kaj malsufiĉa dediĉeblis je perspektiva kaj strategia planado. Kiel ĉiam, la laborforta situacio estas tio, kio bremsas pleje nian antaŭeniron. Ene de nia nuna mandato, ni devas konfronti tiun realecon kaj malkovri vojojn tiri nin for de tiu multjardeka limigo.

Do, unu jarduono malantaŭ ni, kvin ankoraŭ en estonto! Tiktakas la horloĝo!



Tiktake, taktike salutas,



Stefan MacGill
Prezidanto.